

La neĝa blovado de Puŝkin, 2a parto : Traduko de Grabowski
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 436 1972.02.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La unuaj broŝuroj, kiuj ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la esperanto-literaturo, estas nun reeldonataj fotoreprese. La pasintan semajnon ni legis al vi la antaŭparolon, kiun Antoni Grabowski skribis por traduko de la rakonto de Puŝkin : *La neĝa blovado*, kiun li esperantigis el la rusa, kaj kiu aperis en 1888, kiam la Lingvo internacia estis unujara kaj Grabowski mem nur kelkmonata esperantisto.

A.- Hodiaŭ ni legos al vieron el tiu bela novelo de Puŝkin, tio en la teksto mem, kiun tiu represita arkivaĵo alportas al ni. Estus interese kompari tiun tradukon, kiu estas farita kun plej malmulte da radikoj, kun traduko, kiun nun farus bona verkisto, helpe de la hodiaŭa multe pli nuancita esperanto-vortaro. Eble la republikigo de similaj arkivaĵoj instigos serĉantojn al similaj studoj.

Cl.- La rakonto, kiun ni legos al vi, montras kiel Vladimiro perdiĝis en la neĝon, ĵus kiam li devis iri al meznokta rendevuo, kie lin atendadis lia amatino por sekreta geedziĝo en vilaĝa preĝejo. Kiam fine li alvenos en tiun preĝejon, ŝi jam estos for, kaj neniam li revidos ŝin.

A.- Vi rimarkos kelkajn esprimojn aŭ vortojn nekutimajn. Temas pri arkaismoj, kiel **deksteren** por **dekstren**, kaj pri troa uzo de la sufikso **-ad**, kiun en tiu epoko oni ankaŭ trovas ĉe Zamenhof. Sed malgraŭ tio vi rimarkos, kiel bonstile verkis Grabowski, tiu granda ekkunlaboranto de Zamenhof. Ni komencas la citadon de la puŝkina novelo *La neĝa blovado* :

Cl.- *Apenaŭ Vladimiro estis elveturinta en la kampon, eklevi sin vento kaj fariĝis tia neĝa blovado, ke li nenion vidis. En unu minuto la vojo estis kovrita de neĝo, la ĉirkaŭaĵo perdiĝis en la nebulo malklara kaj flaveta, tra kiu flugadis blankaj pecoj de l' neĝo ; la ĉielo sin kuniĝis kun la tero ; Vladimiro ekvidis sin sur la kampo kaj vane li volis denove eltrovi la vojon ; la ĉevalo paŝis rekte antaŭen kaj ĉiuminute jen ĝi veturadis sur neĝan amason, jen faladis en kavon ; la glitveturilo ĉiuminute sin renversadis.*

A.- Vladimiro nur penis ne perdi la veran direkton. Sed ĝi ŝajnis al li, ke jam pasis pli ol duonhoron kaj li ankoraŭ ne alveturis al la Ĵadrina arbareto. Pasis ankoraŭ ĉirkaŭ dek minutoj, la arbareto ĉiam ankoraŭ ne estis videbla. Vladimiro estis veturanta tra kampo tranĉita per profundaj kavoj. La neĝa blovado ne trankviliĝadis, la ĉielo ne ellumiĝadis. La ĉevalo komencis haltadi kaj de li la ŝvito faladis kiel hajleroj, malgraŭ ke li ĉiuminute estis ĝis la duono en la neĝo.

Cl.- Fine li ekvidis, ke li veturis en malvera direkto. Vladimiro haltis : li komencis pripensadi, rememorigadi, prezentadi al si kaj certiĝi, ke li devis preni la vojon deksteren. Li veturis deksteren. Lia ĉevalo apenaŭ paŝadis. Jam pli ol unu horon li estis en vojo. Ĵadrino devis esti proksima. Sed li veturis, veturis, kaj la kampo ne havis finon. Ĉie neĝaj amasoj kaj kavoj ; ĉiuminute la glitveturilo sin renversadis, ĉiuminute li ĝin levadis. La tempo pasadis, Vladimiro komencis forte maltrankviliĝi.

A.- Fine en la flanko sin montris io nigra. Vladimiro tien sin turnis. Proksimiĝante li ekvidis arbaron. Glor' al Dio, li ekpensis, nun ĝi estas proksima. Li veturis al la arbaro, esperante baldaŭ trovi la konatan vojon aŭ ĉirkaŭveturi la arbareton : Ĵadrino estis tuj post ĝi. Baldaŭ

li trovis la vojon kaj enveturis en la mallumon de l' arboj, nudigitaj de la vintro. La vento ne povis tie kolerigi ; la vojo estis glata ; la ĉevalo reprenis la kuraĝon kaj Vladimiro trankviliĝis.

Cl.- Sed li veturis kaj Ĵadrino ne estis videbla ; la arbaro ne havis finon, Vladimiro kun teruro ekvidis, ke li estis enveturinta en nekonatan arbaron. Malespero lin prenis. Li ekbatis la ĉevalon ; la bedaŭrinda besto ekiris kure, sed baldaŭ ĝi komencis haltadi, kaj post kvaronhoro ĝi komencis iradi paŝe, malgraŭ ĉiuj fortuzojn de la malfeliĉa Vladimiro.

A.- Baldaŭ la arboj komencis maldensiĝi kaj Vladimiro elveturis el la arbaro ; Ĵadrino ne estis videbla. Ĝi devis esti ĉirkaŭ la meznokto. La larmoj ekfluis el liaj okuloj ; nun li veturis rekte antaŭen. La vetero trankviliĝis ; la nuboj disiradis ; antaŭ li kuŝis ebenaĵo, kovrita de blanka ondforma tapiŝo. La nokto estis sufiĉe luma. Li ekvidis nemalproksime vilaĝeton, kunmetitan de kvar aŭ kvin kortoj. Vladimiro veturis tien. Ĉe l' unua dometo li elsaltis el la glitveturilo, alkuris al la fenestro kaj komencis frapadi. Post kelkaj minutoj la ligna fenestra kovrilo sin levis kaj ia maljunulo elmetis sian grizan barbon.

Cl.- Kion vi bezonas ?

A.- Ĵadrino estas malproksima ?

Cl.- Ĉu Ĵadrino estas malproksima ?

A.- Jes, jes, ĉu ĝi estas malproksima ?

Cl.- Proksimeta, estos ĉirkaŭ deko da verstoj.

A.- Ĉe tio ĉi Vladimiro ekkaptis la kapon kaj restis senmova kiel homo juĝita al la morto.

*Cl.- Ni nun konkludas nian citaĵon. Inter la arkaismoj vi eble rimarkis la uzon de la pronomo **ĝi**, kiam ĝi ne estas necesa. Multajn similajn detaletojn ni povus studi, kiel ekzemple la uzon de la prepozicio **per** anstataŭ la prepozicio **de**. La kaŭzo estas, ke Grabowski estas novbakita esperantisto, kaj ke samtempe esperanto estis sentradicia lingvo.*

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !